



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D ET

N-ro 1 1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Cefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

LINGVO KAJ IMITADO

Estas konata fakto, ke oni plej bone lernas lingvojn per imitado. Se ne, kiel povus infanoj lerni — sen kono de helpaj gramatikaj reguloj — sian gepatran lingvon, kaj ofte, aldone, ankaŭ alian lingvon? Kaj kiel ekspliki la perfektan prononcon ĉe kelkaj papagoj?

Tial ni devas, lernante lingvojn, imiti laŭokaze. Ni devas aŭskulti al radio kaj televido, al la paroloj en filmoj. Kaj ni devas legi kun atento, ĉar ankaŭ nian skriban lingvon ni devas perfektigi. Efektive ĝuste la skriban lingvon, ĉar la skribita teksto *restos*, dum la parolataj vortoj estas nur por la momento (kio ne signifas, ke ni ne atentu ankaŭ pri nia buŝo).

Oni ofte demandas min, ĉu mi ne enmiksas vortojn de unu lingvo en alian lingvon. Kompreneble tio *povas* okazi, sed neniam ĝenis min. Mi volas mencii la solan fojon, kiun mi povas memori. Tio okazis en 1938, kiam mi, lernanto en gimnazio, ĵus eklernis Esperanton. Mi devis skribi anglalingvan taskon pri Lloyd George, kaj uzis la esprimon «he translodged». Lektoro Sky, mia instruisto pri la angla, demandis, kie mi trovis tiun vorten, kiun li ja senpere komprenis, sed neniam antaŭe renkontis, nek povis trovi en vortaroj. Mi ne sciis, kion respondi, ĉar la vorto ŝajnis al mi tiel konata, kaj mi ne ekpensis pri tio, ke ĝi povus esti Esperanta.

Mi mencias tiun travivaĵon, ĉar ĝi tiel klare montras, kiel ni *ne* procedu. Ni neniam traduku vorton post vorto, sed la enhavon, la eldiron de la frazo. Kiel tute nova esper-

antisto oni ofte baraktas en la pinĉilo de la gepatra lingvo. Oni fervore konversacias en Esperanto kun siaj amikoj, kaj, parolante pri ĉiutagaj aferoj, ofte bezonas ĉiutagajn esprimojn. Ĉe tio oni forgesas, ke la ĉiutaga lingvo estas plena de kliŝoj kaj idiotismoj, t.e. netradukeblaj esprimoj. Kaj netradukeblajn esprimojn oni prefere ne traduku. Ekzemple ni ofte diras pri afero, kiu havas du konsiderindajn flankojn, ke «det kan være både og». En vortaro ni trovas, ke «både — og» estas en Esperanto «kaj — kaj». Sed tio bedaŭrinde ne signifas, ke oni diru, ke la afero estas «kaj kaj», esprimo nekomprenebla por aliaj ol norvegaj komencantoj pri Esperanto. Same oni ne diru: «Tio ne estis tiel malbona» por «det var ikke så verst», kiel mi aŭdis — cetero ŝerce — antaŭ kelka tempo.

Verŝajne la komencantoj ne legas ĉi tion. Sed verŝajne la *eternaj komencantoj* legas. Kaj ĝuste la eternaj komencantoj devas pensi serioze pri ĉi tiu problemo. Kial? Ĉar ili restis eternaj komencantoj, pro tio, ke ili ne atentis pri ĝuste ĉi tiu demando.

De tempo al tempo oni povas, precipe en la internaciaj Esperantorevuoj, legante artikolon, rimarki la gepatran lingvon de la aŭtoro «tra la linioj». Same kompreneble en leteroj, kaj en esprimoj. Ofte tiuj esprimoj estas tre taŭgaj ankaŭ en Esperanto. Franco ekzemple emas uzi la esprimon «bonvolu trovi en ĉi tiu koverto la tekston por . . .», kaj tiu frazo sonas bone kaj efikas laŭ sia

OFICIALA KOMUNIKAJO DE LA AKADEMIO

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) «solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof», kaj de la unuana Komitato de UEA «kiel eble plej baldaŭ» difini tiun solvon;

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. «Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970» = do la garantiantoj estos kvitaj:
 - A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;
 - B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.
2. «Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo» =
 - A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;
 - B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.
3. «Ni asertas, ke la aŭtomobilo de sro X estis efektive riparata la lastan samajnon» =
 - A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;
 - B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.
4. «Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio» =
 - A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;
 - B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-an de Junio.

intenco ankaŭ en Esperanto, sed ni ja subaŭdas la francan «veuillez trouver».

Ni norvegoj eble estu precipe atentaj pri tiuj kazoj, kie ni ellasas la difinitan artikolon. Ni diras «neste dag», «samme år», «siste gang» ktp., kaj emas laŭvorte traduki «postan tagon», «saman jaron», «lastan fojon», ne pripensante, ke temas pri difinitaj tempindikoj: do difinita artikolo en Esperanto.

JHR.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonitoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉiusuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967.

G. Waringhien, *Prezidanto*
P. Neergaard, } *Vicprezidantoj*
A. D. Atanasov, }
R. Bernhard, *Sekretario*
D. B. Gregor, *Direktoro de la Gramatika Sekcio.*

DONACOJ AL LA KONTORFONDAĴO

| | |
|---|--------------|
| R. Bugge-Paulsen | kr. 90,00 |
| C. S. B. | » 80,00 |
| G. Høibo | » 5,00 |
| D. Birkelund | » 38,00 |
| J. Stenström | » 20,00 |
| A. Refsing | » 180,00 |
| O. Rygg | » 12,50 |
| H. Danielsen | » 23,50 |
| S. Korstvedt | » 10,00 |
| I. Dahl | » 4,65 |
| Sauda Esperantoklubb | » 25,00 |
| T. Reimar | » 36,00 |
| Kontribuado de Klubo Esperantista en Oslo | » 200,00 |
| | kr. 724,65 |
| Pli frue en la jaro 1967 | » 966,50 |
| Tuta sumo | kr. 1 691,15 |

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

HONORIGO AL KARL EKHAUGEN

En Decembro 1967 Karl Ekhaugen, Oslo, ricevis la Reĝan Medalon de Merito pro 50-jara fidele laborado en Andresens Bank. Karl Ekhaugen estas ankaŭ de 10 jaroj la konsciencplena, senlaca kasisto de N.E.L. Ni kore gratulas al li okaze de la meritita honorigo.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Invito

Gazeto ne estas nur tio, kio eliras el la manoj de la redaktoroj. Gazeto estas same multe, aŭ devas esti, stampita de la legantaro. La abonantoj-legantoj estas tiuj, kiuj vere *posedas* la gazeton, kaj kiuj devas tial flegi ĝin, konsili, kritiki, verki. Tion ni volas nun, sur la sojlo de la nova jaro des pli forte substreki, ĉar en la ĵus pasinta jaro la alfluo de manuskriptoj kaj aliaj kontribuaj estis malpli forta ol iam antaŭe. Ni tial invitas vin kontribui. Sed samtempe ni devas ripeti nian insistan peton: skribu tajpe. Bonvenaj estos viaj verkaĵoj.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado de la gazeto, ni varme petas vin bonvolu tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu sendi sian kotizon kr. 20,00, familianoj kr. 10,00, junuloj kr. 7,00 al N.E.L., Boks 942, Oslo 1, (poŝtgirokonto 100 30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi sian kotizon al la kluba kasisto. Kaj al la *klubaj kasisistoj* ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* ekaĝi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1968, kaj ĉiukaze sendi al ni liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj.

noj plej malfrue en la unua semajno de Februaro. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantaj membrojn de N.E.L. La kotizo estas kr. 30,00 por unu jaro. Klubanoj fariĝas subtenantaj membroj pagante kr. 15,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

33a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Madrid, Hispanujo 3.—10. Aŭgusto 1968. Turisma Servo de N.E.L. planas komunan vojagon, kaj laŭ peto sendas bultenojn kaj aliĝilojn, kaj akceptas aliĝojn kaj mendojn. Interesigantoj turnu sin al la Turisma Servo laŭeble baldaŭ, por ke oni havu ideon pri la interesiĝo.

La kontorfondaĵo ricevis malpli multe da donacoj en 1967 ol dum la antaŭa jaro, sed la luprezo ne malaltiĝis. Ni tial permesas al ni memori pri tiu grava donacofondaĵo. Ĉiuj donacoj estas bona helpo por la ekonomio de N.E.L.

La propagandan fondaĵon oni laŭŝajne tute forgesis en 1967, ĉar ĝi ricevis donace nur kr. 20,00, de nia sveda amiko John Stenström. Sed la estraro uzis el la fondaĵo por gravaj celoj, tiel ke ĝia kapitalo konsiderinde malkreskis. Ni tial permesas al ni memori la membrojn ankaŭ pri tiu grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. — Februaro. La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn studrondojn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poŝtgirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj kaj oni dissendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri

donacabonoj al Norvega Esperantisto). Oni laboris pri revizio de la korespondaj kursoj (per Lars Kåre Hunnes) kaj pri publikigo de norvega traduko de dok. C.E.D./7. Oni aĉetis de Th. Dybing duonelektran skribmaŝinon kaj elektran duplikatoron. Oni sukcesis starigi Esperanto-ekspozicion en fenestro de la Hispana Ŝtata Turistoficejo en la centro de Oslo. Oni decidis ne okazigi landan kongreson en 1968. «Norsk Kulturråd» rifuzis doni subvenciojn al Norvega Esperantisto. Oni klopodis ekhavi kontakton kun la organizaĵoj de handikapuloj. La Liga Konsilantaro nomis Oddmund Rykkvin observanto en la Konsilantaro en la loko de Ragnv. Rian, kaj decidis ke 1968 estu «provjaro», dum kiu la kluboj sendu nur duonjarajn raportojn al N.E.L., kondiĉe ke ili tuj anoncos ĉiujn starigitajn kursojn.

La Liga Estraro.

Ferenc Szilágyi

Jus leginte la novelaron «La granda aventuro», kiu ial forte impresis min, mi iris, en la pentekosto 1946, kune kun kelkaj aliaj anoj de Klubo Esperantista en Oslo, al la jubilea kongreso de la svedaj esperantistoj en Uddevalla. Tie ni renkontis, inter multaj aliaj impresaj personoj, ankaŭ D-ron Ferenc Szilágyi, kiu impresis min multe pli ol lia ĵus legita novelaro, kaj kiu post tiam estis mia bona amiko, malgraŭ la aĝdiferenco, kiu ŝajnis esti multe pli granda tiam, kiam mi estis juna studento.

La 1-an de decembro mortis D-ro Szilágyi, ĉ. 72-jara: Helpema, afabla, bonhumora homo malaperis. Inteligenta, scioplena, valora batalanto por Esperanto mortis. Produktema, brilpluma verkisto formetis por ĉiam sian skribilon.

Szilágyi estis, kiel rakontas la nomo, hungaro. Sed jam antaŭ jardekoj li venis al Svedujo, estis jam longe sveda statano, majstris la svedan lingvon, el kiu li multon ĉerpis por siaj tradukoj kaj por siaj kulturaj artikoloj. Lia hejmo en Borås fariĝis fajrujo de Esperanto. Tie li sidis kun sia laboro de socialkonsilanto, tie li verkis, tradukis, tie li redaktis la revuon «Norda Prismo», kiun li mem fondis, kaj kiun li ame vartis. Estis plezuro kunlabori kun li sur tiu kampo.

Samtempe ni devas menciigi, ke li ja samtempe estis unu el la plej fortaj kolonoj de Literatura Mondo, ke li kunlaboris kaj al la Sveda kaj al la Hungara Antologioj, kaj cetere ankaŭ al «Enciklopedio de Esperanto». Li verkis bonan kaj amuzan lernolibron de Esperanto, kaj li verkis novelarojn, krom la jam menciita «Trans la fabeloceanon», «Inter Sudo kaj Nordo», «Koko krias jam» kaj la romaneton «Mistero Minora».

Johan Hammond Rosbach.

JOHN STENSTRÖM

La sveda Esperanto-movado perdis ankaŭ alian fidelan kunbatalanton, kun kiu mi konatiĝis kaj amikiĝis ĉe la sama okazo kiel kun D-ro Szilágyi. Multaj estas la norvegaj esperantistoj, kiuj kun ĝojo memoras la varman afablon kaj la noblan personon de lektoro John Stenström, Jönköping, kiu mortis la 9-an de oktobro, ĉ. 82 jara. Lektoro Stenström, spertulo pri la angla lingvo, kaj tial des pli konvinka prelegisto, ĉiam elegante prezentis siajn temojn, kaj ĉiam en senmakula Esperanto. Li multe partoprenis en kongresoj kaj kursoj, entute la internacia esperantista atmosfero havis grandan altiran forton al li, kaj multaj estas tiuj, kiuj pensos pri malgrandaj plezuroplenaj epizodoj. Ni menciigu ankaŭ, ke Stenström estis varma amiko de Norvegujo kaj de la norvega Esperanto-movado. Li donace abonis la svedan

Poezio

Kristoffer Uppdal:

STAREN HAN SIT

Tegmente la sturno sidas
kaj kantas pri ama sopir'.
Sturnino lin aŭdas, avidas,
aŭskultas al kant' per admir'.

La tonoj argente dancadas,
promesas pri nesto kaj ĝu'.
Sed se li edzinon jam trovis,
neniam li ludas plu.

Trad. H.A.R.

gazeton «La Espero» por pluraj norvegaj samideanoj, mi mem estas inter tiuj, kiuj li tiel gojigis. Kaj ankoraŭ en ĉi tiu numero de Norvega Esperantisto lia nomo aperas sur la listo de kontribuintoj al la Kontorfondajo. Li estis fidela ĝis la lasta tago.

Johan Hammond Rosbach.

DORDI JOHANSEN

La 14an de Novembro forpasis f.ino Dordi Johansen, unu el la plej malnovaj membroj de Klubo Esperantista en Oslo. Antaŭ la lasta milito ŝi gvidis sennombrajn kursojn ĉe «Friundervisningen», kaj ŝi estis kuntraduktinto de «Gaja Knabo» de Bjørnson. Ni deziras pacon al ŝia memoro.

JON NORSTRØM

La 22an de Novembro forpasis instruisto Jon Norstrøm, Elverum. Li estis esperantisto de proks. 35 jaroj, kaj la plej multjara subtenanta membro de N.E.L. Ni deziras pacon al lia memoro.

JON E. STAVENES

Dum la aŭtuno 1967 forpasis John E. Stavenes, Stavenli, multjara fidela membro de N.E.L. Pacon al lia memoro.

KLARA DYPVIK

Aŭtune 1967 subite forpasis Klara Dypvik, Trondhejmo, fidela esperantistino kaj domprizorgintino de Ragnv. Rian. Pacon al ŝia memoro.

Arnulf Øverland:

HER EN STILLE VINTERAFTEN

En silenta frostvespero
sola, olda muŝo venis
por ek trovi novan hejmon,
ĝin en mia domo prenis.

Kaj dum la vesperalveno
— dum kandelon mi eklumas —
kune kaj mallaŭte kanton
mi kaj muŝo ambaŭ zumas.

Trad. H.A.R.

Hans Amund Rosbach:

EL PROPRA KAJ FREMDA

Posedas mi grandan trezoron,
perlojn kaj gemojn kaj oron —
en mia bretaro ĝi staras:
el ĉio la libroj plej karas.

Plej granda juvelo el ĉio
sendube ja estas Biblio,
— kaj himnoj kaj kantoj, poemoj:
jen oro kaj perloj kaj gemoj.

Alian trezoron mi havas,
kompare kun tiu ne gravas;
malgranda nur mia talento,
sed tamen: ĉu kupro? argento?

Johannes Smemo:

Å HERRE, RIV DIN HIMMEL SUND

Disŝiru la ĉielon, Di',
kaj venu suben tuj al ni!
Rigardu Vi al nia ve',
Di-regnon helpu el pere'!

Silente diras Vi: «Mi jam
pro via ve' kaj mia am'
min donis al la kruca mort'
sen eĉ de vi bonvena vort'.

Kaj sciu, en ĉiel' sur ter'
mi ĉion, ĉion regas per
l' aŭtoritato, kiun mi
ricevis de la Patra Di'.»

Nun mi komprenas, ho Sinjor',
neniam plu Vi restos for,
sed gvidas nin al alta cel',
al malfermita la ĉiel'.

Nin helpu do al sankta fid'
dum nin malhelpas nia vid',
ĝis en reveno Via el
la ter' kreigos lumĉiel'.

Trad. H.A.R.

„Ĉielarko“ de Julio Baghy

La lasta verko de nia granda poeto, ĉarma kolekto de fabeloj
verse reverkitaj

Kr. 10,50

(Aldonu 10 % por la sendekostoj.)

ELDONEJO ESPERANTO — Boks 942 — Oslo 1

Diverse

PRI ZAMENHOF EN NORVEGA LIBRO

Pere de mia filino kiu dum la aŭtuno laboris en la biblioteko en Stavanger, mi eksciis ke troviĝas interesa artikolo pri Zamenhof en libro de Lars Rustbøle. La libro nomiĝas «Solskinnsbarn», 6. samling, eldono: De unges forlag. La libro konsistas el multaj rakontoj, kaj unu havas la titolon: Doktor Esperanto.

Mi ne volas recenzi la libron, nur atentigi vin pri la fakto, estas nome tre, jes tro, malofte ke aperas io ajn pri Esperanto en norvegaj libroj!

Tiuj kiuj povas, aĉetu la libron. Almenaŭ vi ĉiuj povas viziti la plej proksiman bibliotekon por pruntepreni ĝin, prefere demandante ĉu ili havas la libron de Rustbøle en kiu troviĝas artikolo pri la kreinto de Esperanto.

Elna Matland.

NOVA FIAT-FILMO

Nova kolor-filmo, kun esperanto-parolo estas eldonita de Fiat kino-fako.

La titolo estas «Test Fiat 125». Ĝi daŭras ĉ. 20 minutojn kaj donas panoraman bildon pri la nova veturilo.

Same kiel la filmoj «Fiat 850», «Fiat 124», «Operacio Sekureco» kaj «Renkonto kun Fiat», ankaŭ «Test Fiat 125» estas ricevebla, senpage laŭ peto, ĉe nia adreso, en la formato 16 mm, por prezentado dum kunvenoj kaj kongresoj.

OFICIALA HISPANA OBSERVANTO

Parolinte al la Ĝenerala Direktoro de Infana Instruado de nia lando, sinjoro D. Joaquín Tena Artigas, pri la baldaŭa 11-a Infana Kongreseto de Esperanto, en la Kadro de la 53-a. U.K. okazonta en Madrido, li oficiale (unue vorte kaj poste skribe) promesis sendi Oficialajn Observantojn al ĝi.

POLAJ STUDENTAJ KORESPONDAS

Ni afable informas vin, ke la studenta semajnevuo «itd», aperanta en Varsovio, aperigas senpage korespond-proponojn de diverslandaj esperantistoj. Samideanoj dezi-

rantaj ekligi korespondan kontakton kun Pollando skribu al la redakcio leteron kun la jenaj informoj: a/nomo kaj antaŭnomo, b/ preciza adreso, c/ interesigoj kaj ŝatokupoj, ĉ/ profesio aŭ studobjekto, d/ aĝo — laŭdezire.

GRENOBLE

«La vintraj olimpiaj ludoj okazos en la urbo Grenoble (Francujo) dum venonta februaro. Okaze de tiu grava evento, samideanoj el la «Kultura Esperanto-Societo Grenobla» deziras ke la Esperantistoj kiuj vizitos la urbon je tiu momento sendu nomon kaj adreson al la Prezidanto:

Johano GALLET. 38 MONTBONNOT. (Francujo).»

LA HIMNO

Estimata Redaktoro,

Sur paĝo 126 de no. 9/10 1967 de «Norvega Esperantisto» ni legis pri kongresa raporto farita en la klubo de Oslo. Tie ni legis: «la kutima kantado de La Espero je la fino de la Inaŭguro de okazis.» Similan rimarkon li legis unu aŭ du pliajn fojojn ie en la Esperanto-gazetaro. — Bedaŭrinde neniam la raportantoj aldonas ke la kantado de La Espero okazis, en plej impona maniero, en la Ferma Kunsido de la Kongreso. Ĝi tre impresis ĉiujn ĉeestantojn kaj donis fortan impulson al ĉiuj ĝuste en la momento de la adiaŭo.

Bonaj observantoj povis konstati, ke tio okazis ankaŭ jam en antaŭaj kongresoj. Multaj spertoj instruis la gvidantojn de UEA kaj de la Kongresoj ke el psikologia vidpunkto la kantado de La Espero en la Ferma Kunsido, post la travivaĵoj de la kongresa semajno, post aŭskultado de la rezultoj kaj ĝuste antaŭ la adiaŭo estas plej efika kaj stimula.

Tiun kompletigon ni deziras doni, ĉar la nura frazo en la raporto povus veki la impreson, kvazaŭ la Kongreso neglektus la kantadon de La Espero.

Kun koraj salutoj, sincere via

M. H. Vermaas
Direktorino CO

På norsk

ESPERANTOBEVEGELSEN HAR MISTET EN PIONÉR

Esperantopressen melder at Hans Jakob, som har spilt en ledende rolle i Esperanto-bevegelsen, er død. Hans Jakob har siden 1909 vært knyttet til Universala Esperanto Asocios daværende hovedsete og senere tjenestesenter i Genève. Under første verdenskrig ledet han forbundets arbeid med oppsporing av savnede sivilpersoner, og under andre verdenskrig opprettet han og ledet «Esperantista Interhelpo», som arbeidet for å hjelpe ofrene for nazi-terroren. Begge disse tiltak har gjentatte ganger vært fremhevet i forbindelse med forslag om å gi Nobels fredspris til Universala Esperanto Asocio.

I sine verv, blant annet som verdensforbundets generalsekretær og som hovedredaktør av tidsskriftet Esperanto, gjorde han en avgjørende innsats for å bygge opp Universala Esperanto Asocio til en hvodorganisasjon for de mange forbund og foreninger som arbeider for et felles internasjonalt språk.

«DEN LILLE RØDE BOK» PÅ ESPERANTO

Det internasjonale språket Esperanto blir i økende omfang brukt i kinesisk informasjon til utlandet. Tidligere er nitten av Mao Tse-tungs skrifter utgitt på Esperanto. Nå foreligger en 343 siders utgave på Esperanto av hans hovedverk «Ord av president Mao Tse-tung» og blir tilbudt til en pris som svarer til to kroner.

MOT SPRÅKDISKRIMINERING

I sammenheng med FN's Internasjonale År for Menneskerettighetene i 1968 forbereder Esperantobevegelsen omfattende tiltak. Verdensforbundet Universala Esperanto Asocio vil særlig konsentrere sin informasjon om de mange former for språk-diskriminering som er i strid med artikkel 2 i menneskerettighetserklæringen.

Menneskerettighetserklæringen er allerede tidligere trykt på Esperanto. Nå er det under forberedelse en ny utgave, som det er meningen å distribuere til alle de steder i verden hvor det finnes Esperantoforeninger eller representanter for verdensforbundet.

NORVEGUJO - turismo

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO raportas pri 2 grandaj sukcesoj en la kampo de turismo:

1) Kunlaborante kun La Turist-rafika Asocio de Oslo kaj ĉirkaŭaĵo la klubo elsendis la esperantlingvan turistbroŝuron pri Oslo — la ĉefurbo de Norvegujo — al 48 diversaj landoj en nombro de proks. 20 000 ekz. inter ili al 55 gazetoj kaj ĵurnaloj esperantlingvaj, kaj al 44 landaj Esperanto-organizaĵoj. Eminentu pruvo pri la utileco de Esperanto kiel internacia lingvo!

2) Laŭ interkonsento kun La Hispana Ŝtata Turistoficejo en Oslo la klubo aranĝas en decembro—januaro grandan Fenestran Ekspozicion en la urbocentro pri la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid 1968. La ekspozicio ampleksas afiŝegon pri la kongreso kun fotoj pri Madrid kaj Hispanujo, turistbroŝurojn, kovertojn, afiŝojn pri Unesco kaj Esperanto, kaj aliajn sciigojn pri kursoj, kluba adreso, Esperanto-eldonejo k.t.p. kaj fine afiŝon kun admono lerni Esperanton dum la vintro por povi partopreni la kongreson venontsomere! La Hispana Ŝtata Turistoficejo en Oslo ankaŭ okazigos gazetaran konferencon, fotografadon kaj komunikaĵon al la Ŝtata Telegramoficejo en Oslo pri la ekspozicio, kaj aranĝas ĉion senpage por la klubo!

John Berggren.

RECENZOJ

LIBERA LINGVO

Vilho Setälä:

Esperanto — libera lingvo.

N-ro 3 en la Serio «Esperanto — moderna lingvo.» Kajero 12-paga, eld. Fondumo Esperanto, Helsinko 1967. Prezo: 1 RK.

La kajero estas letero al D-ro Kálmán Kalocsay, kiu elektis kiel moton por sia gramatika verko «Vojaĝo inter la tempo»

eldiron de la fama finna lingvisto profesoro E. N. Setälä, la patro de la verkisto de nia kajero, Nun la aŭtoro montras al d-ro Kalocsay, ke profesoro Setälä ne havis tiun opinion pri la participoj, kiel la t.n. itistoj. La aŭtoro neniel volas malpermesi al la itistoj uzi sian nelogikan «Consecutio temporum», sed li volas simple montri, ke la tempa sistemo de la participoj estas en plena harmonio kun tio, kion lia patro pensis pri ĝenerala gramatiko kaj pri Esperanto, kaj fine li pledas por ke ni ne katenu nian lingvon per regulo, kiu limigas ĝian esprimopovon kaj rompas la belan simetrian kaj purecon de ĝiaj esprimoj. Esperanto restu nia libera lingvo.

JHR.

LA PLATIRINKO

La anasoj ne apartenas al tiuj birdoj, kiuj altiras al si la atenton. Ĝenerale ili estas senbrujaj kaj silentaj. La sola periodo, en kiu ili estas bone aŭdataj, estas en marto—majo. Tiam nome estas la kunpariĝa tempo de la anasoj.

La plej kutima el niaj anasoj estas la *platirinko* (nor. stokkand) (anas platyrhynchos). Kiel la majoritato de la birdoj la virbirdo havas la plej belan kolorveston. Ĝi havas verdan kapon kun flava beko kaj ruĝan bruston. La resto de la birdo estas bruna kaj griza. La ino estas brunmakula. Komuna por ambaŭ estas la karakteriza blua flugilrubando. Nur la platirinkoj tion havas. La platirinkoj plej ŝatas lokojn kun malprofunda akvo kaj bona vegetaĵo. Sed ĝi kovas ankaŭ ĉe riveroj, riveretoj kaj foje ĉe la maro. La nesto kuŝas bone kaŝita sub arbusto, en kavaj arboj aŭ eĉ en kovkestoj. Ordinare la nestoj estas zorgje faritaj kaj tegitaj per fajnaj lanugoj, kaj la dek ĝis dek du grizverdaj ovoj estas kovataj ekskluzive de la ino. La virbirdo forlasas la inon post la komencigo de la kovado. Okazas ankaŭ ke anasoj tranprenas kornikan neston alte en arbaro. Oni eĉ trovis la nestojn en pajlostako. Ĝi povas elekti sian kovejon multajn kilometrojn for de la akvo, tiel ke la ino devas promeni la longan vojon kun siaj idoj. Tial estas miraklo, ke la anasfamilioj tiel bone transvivas.

En la lasta parto de la somero estas ku-

time vidi anaspatrinon promenanta kun la idaro post si. La idoj de la platirinko iras en la akvon nur unu tagnokton post la elkoviĝo.

Sur insulo mi foje vidis maljunan pinon kiu kliniĝis super la akvon. En la larĝa krono estis forlasita kornika nesto, kiun transprenis platirinkino. Mi miris, kiamaniere ĝi kapablos ekhavi siajn idojn sur la akvon, kaj tio okazis pli dramece ol mi atendis. La anaso kuŝiĝis sur la akvo sub la pino, komencante logvoki, kaj la idoj elsaltis en la malfiksitan aeron prenante la akvon kun plaŭdo. Malfruaŭtune la anasoj flugas de siaj kovejoj, kiuj iom post iom glaciĝas. En tiu ĉi urbo ni povas vidi bonan ekzemplon pri tio. Jetante rigardon sur la Tista-riveron oni povas vidi pli aŭ malpli grandan amason da platirinkoj. Tiuj anasoj ĉefe vivas per la manĝo, kiun elĵetas por ili birdamantoj.

Vintre kaj printempe la koloroj de la platirinko estas plej belaj. Dum la resto de la jaro ankaŭ la virbirdo havas la saman modestan koloron kiel la anasinoj kaj anasidoj, tiel ke ili kongruas kun eriko kaj herbo. Al tio venas, ke la anasoj plej ofte ripozas dum la tago, elmontrante plej grandan aktivecon en la krepusko vespere kaj matene. Tamen la anasoj apartenas al la etoso de la norvega naturo dum ĉiuj partoj de la jaro.

(El Halden Arbeiderblad trad. H. Fr.)



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA FERVUJISTA ASOCIITO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstribben 22, Oslo 9

LA SETESDALFERVOJO

En 1896 malfermiĝis fervojo de Kristiansand al Byglandsfjord en Setesdalen.

Tiu fervojo estis etŝpura, en la mezuro 1067 mm inter la reloj, kaj antaŭ la epoko de aŭtomobilismo, ĝia tasko estis transporti pasaĝerojn kaj varojn de Kristiansand al la finstacio apud la longa mallarĝa lago Byglandsfjord.


Norden de tiu stacidomo, la transporto okazis per vaporŝipoj al la norda lagfino, kaj de tie al la nordaj Setesdalkampoj, la transporto transpreniĝis de ĉevalveturiloj.

En la 1930-jaroj la aŭtotrafiko anstataŭigis kaj la ŝipojn kaj la ĉevalveturilojn, sed la

fervojo veturis ankoraŭ kelkajn jarojn. De 1938 la liniosekcio Grovane — Kristiansand fariĝis parto de la normalŝpura Sørlandsbanen, kaj etŝpura restis nur la sekcio Grovane — Byglandsfjord.

En Grovane devis esti malpraktika kaj temporaba transkargado, kaj la vojaĝantoj ankaŭ devis ŝanĝi de etŝpura al normalŝpura trajno. Tio okazis ĝis jaro 1962, sed tiam oni ĉesigis la trafikon laŭ la Setesdalfervojo.

Sed en Kristiansand kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas fervojentuziistoj, kiuj emas konservi tiun strangan liliputfervojon, kun la malmoderaj malgrandaj lokomotivoj kaj vagonoj.



Propono pri enketo pri Esperanto kontraŭ nacia lingvo kiel internacia. Enquête.

1. Mener du at språkforskjellen i verden er en hindring
 - a) for den økonomiske utvikling?
 - b) for tilnærming mellom folkene?
2. Ville valget av et nasjonalspråk gi politiske, økonomiske og kulturelle fordeler for vedkommende nasjon?
3. Tror du at et klassisk språk som latin eller gresk kunne brukes som internasjonalt språk?
4. Tror du at et nytt språk, basert på naturlige rotord, kunne brukes som internasjonalt språk?
5. Vet du at det finnes et slikt språk som heter Esperanto?
6. Vet du om andre slike språk?
7. Mener du at ett språk for internasjonalt samkvem ville føre til en felles internasjonal kultur?
8. Mener du at en internasjonal kultur er ønskelig?

9. Mener du at skolemyndighetene burde tenke alvorlig over det internasjonale språkproblemet?


En Heroldo mi legis pri enketo farita inter studentoj en Italujo kaj U.S.A. Mi proponas ke ĉiu el vi, en via loko, kontaktu kun lektoro aŭ instruisto en la alta lernejo (ungdomsskolen, aŭ la gimnazio) demandante lin disponi l horon por ĉi tiu enketo. La lernantoj respondu memstare, sen iu influo de vi aŭ de la instruisto.

Poste vi kolektu la respondojn, verku artikoleon pri la enketo, kaj sendu ĝin al via loka gazeto.

Mi estas konvinkita ke tia enketo pli grandigos la intereson por la lingva problemo, donos bonvenan ŝanĝon en la leciono por la lernantoj, kaj donos al nia movado iom da «vento» kiun ni ja tre bezonas.

La demandoj estas tiel faritaj ke mi pensas ke la instruisto volas akcepti la enketon.

Elna Matland.



Ili nun rajtas veturi plezurekursojn sur malgranda parto de la linio, kelkajn kilometrojn de Grovane stacidomo al la nuna fino, Beihølen.

Ni rekomendas al tiuj kiuj vizitas Kristiansand, ke ili prenu la okazon al ekskurso per la antikva trajno, kie deĵoras kiel konduktoj kaj lokomotivpersonaro knaboj en la aĝo 8 ĝis 80.

La fervojtrafiko nur okazas somere, kaj la veturtempoj estas troviĝeblaj en Rutebok for Norge (Norvega Horarlibro).

Plurajn detalojn pri la Setesdalfervojo vi ricevas se vi skribas al Setesdalsbanens Hobbyklubbs sekretariat, V. Strandgt. 33, Kristiansand S.

Per Johan Krogstie.

UNESKO-novaĵoj

RAJTOJ DE LINGVAJ MALPLIMULTOJ

Pli ol 40 delegitoj de 17 landoj partoprenis la Eŭropan Konferencon pri Lingvaj Malplimultoj, kiu okazis en Oslo dum aŭgusto. Inter la nacimultaj lingvoj reprezentitaj estis la bretona, la lapona, la makedona kaj la kimra.

En sia inaŭgura parolado s-ro Kjell Bondevik, la norvega Ministro pri Ekleziaj aferoj kaj Edukado, diris, ke ne sufiĉas nur toleri lingvajn malplimultojn, sed necesas doni al ili juran rajton je respekto. Alia parolanto, prof. Magne Oftedal, atentigis, ke la amas-komunikiloj kaj la hodiaŭa distraja industrio minacas eĉ la ekziston mem de la lingvaj malplimultoj.

NORMIGO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ

Elstaraj kartografoj kaj lingvistoj el 128 landoj kunvenis de la 4-a ĝis la 22-a de septembro 1967 en Genevo por konferenco organizita de Unuiĝintaj Nacioj por unuecigo de geografiaj nomoj. Ili pristudis, kiamaniere malpliigi la nun regantan konfuzon, kiun kaŭzas la neegala uzado internacia kaj eĉ nacia rilate nomojn de urboj, riveroj, montoj k.s.

KATALOGO DE UNESKO-TRADUKOJ

Pli ol 200 titoloj aperas en la dulingva (angla-franca) katalogo, kiun ĵus eldonis Unesko sub la titoloj «Programme Unesco de traductions d'oeuvres littéraires»/«Unesco literature translations programme». Temas pri katalogo de tradukoj en kvin ĉefajn lingvojn — la araba, angla, franca, persa kaj hispana — eldonitaj aŭ sub aŭspicio de Unesko aŭ laŭ kontrakto kun tiu organizaĵo. La originaloj devenas el 60 diversaj literaturoj, proksimume 40 orientaj kaj 20 eŭropaj lingvoj.

La katalogo estas senpage ricevebla de la Departamento de Kulturo, Unesko, Place de Fontenoy, F-75-Paris (7e), Francujo.

KONGRESO DE UNUIGINTAJ URBOJ ĈE UNESKO

De la 12-a ĝis la 15-a de septembro okazis en la Domo de Unesko en Parizo la sesa kon-

greso de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Urboj, kun la temo «Ĝemeligo kaj interurba kunlaboro servas al la paco». La Organizaĵo havas kontaktojn kun urboj en pli ol 60 landoj. De post ĝia fondo en 1957, okazis jam pli ol 700 ĝemeligoj peritaj de Unuiĝintaj Urboj.

NEOLITIKA SKRIBO?

Rumanaj arheologoj lastatempe eltrovis apud Tartaria en Transilvanio du tre rimarkindajn prahistoriajn argilajn tabuletojn, kun ĉizitaj signoj, kiuj ŝajnas esti la praformo de skribado. Apud la surskribitaj tabuletoj troviĝis alia kun bildo pri ĉasado, braceleto el konkoj kaj nombro da statuetoj alabastraj kaj terakotaj. Ĉiuj devenas el la periodo 2900—2700 a.K. La tabuletoj estas do konsiderinde pli fruaj ol la plej fruaj restaĵoj de minoa skribo el Kreto, kaj pli fruaj ol la plej fruaj konataj ĉinaj skribaĵoj, la orakolaj ostoj.

NOVA ALFABETO POR LA LAŬA LINGVO

Specialisto sendita de Unesko al Laoso, belga lingvisto, preparas la unuan fonetikan alfabeton de la laŭa lingvo, uzante latinajn literojn kaj internaciajn simbolojn. La nun uzata alfabeto devenas el Hindujo kaj apartenas al la sudhinda tipo uzata ankaŭ por la taja, sinhala, malajala kaj aliaj.

NACIA ATLASO DE PAKISTANO PRESKAŬ FINITA

La celo de la unua ampleksa Nacia Atlaso de Pakistano, nun preskaŭ prespreta, estas doni fidindajn informojn pri preskaŭ ĉiuj aspektoj de la lando, kiuj gravas por la nacia planado. Ĝi montras ne nur la geologion, flaŭron, temperaturojn, humidecon, teruzadon, ŝoseojn, fervojojn kaj aliajn fizikajn trajtojn, sed ankaŭ la densecon de la industria kaj agrokultura laboristaro, la urbajn kaj vilaĝajn industriojn, la lingvojn, religiojn, centrojn de esploroj kaj edukado, bankojn kaj aliajn financajn instancojn.

53-a Universala Kongreso de Esperanto

MADRID, 3.--10. Augusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Franco,
Statestro de Hispanujo.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2 Nederlando.

Kotizoj:

Ekde de la 1-a de jan. 1968 la aliĝkotizoj estas jenaj:

Kongresano 77,— gld. Studento 38,50 gld.
Edz(in)o 33,50 gld. Blindulo 31,— gld.
Junulo 23,— gld.

La personoj kiuj deziras pagi en pesetoj, bonvolu atenti ke, pro la devaluto de tiu mono, la kotizoj, en pesetoj, plifruue anonci-

OKCIDENTAJ ĈEFVERKOJ EN HINDAJ TRADUKOJ

Otelo de Shakespeare, *Antigona* de Sofoklo, la *Respubliko* de Platono, *Faŭsto* de Goethe kaj *Herbofolioj* de Walt Whitman troviĝas inter la ĉefverkoj de okcidentaj literaturaj lastatempe tradukitaj en plurajn hindajn lingvojn sub aŭspicio de la Hinda Bel-literatura Akademio (Sahitya Akademi) kaj kun helpo de Unesko. Same aperis inter la plej lastaj titoloj antologio de jugoslavaj noveloj.

ENCIKLOPEDIA HISTORIO DE AFRIKO APERIS EN LA ĈEĤA

Du dikajn volumojn pri la historio de Afriko eldonis lastatempe la eldonejo Svoboda en Praha. Tiu ĉi verko, ampleksa pli ol mil paĝojn kaj abunde ilustrita per fotoj, desegnaĵoj kaj mapoj, estas unu el la plej kompletaj ĝis nun aperintaj pri la temo. Malgraŭ tio, la aŭtoroj devis limigi la pritrakton al tiuj afrikaj popoloj, kiuj grave influis la evoluon de diversaj regionoj de Afriko aŭ de la tuta kontinento. Ili dividis Afrikon en dek bazajn geografiajn partojn: Egiptujo, Orienta Sudano, Magrebo, Etiopio, Okcidenta kaj Centra Sudano, la Gvineo Marbordo, Ekvatora Okcidenta Afriko, Orienta Afriko, Suda Afriko kaj Madagaskaro.

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

taj kaj presitaj sur la aliĝilo, estu kalkulitaj laŭ la kurzo: 1 gld. = 20 pes.

Foto-Konkurso:

Okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968, LKK aranĝas internacian Foto-Konkurson kun tri premioj, de 100, 70, 40 Ned. Gld. respektive. La partopreno estas nelimigita: ĉiu rajtas konkursi per laŭvola nombro da nigrablankaj fotoj en minimuma formato 13 x 18 cm. Kiel temon oni rajtas elekti kiun ajn citaĵon el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (unuopaj ekz. senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso).

La konkursajoj devas esti senditaj antaŭ la 1-a de julio 1968 al 53-a Universala Kongreso de Esperanto, Postkesto 19039, Madrid, Hispanujo.

Fervoja Rabato:

Kun la Dua Bulteno estos sendita al ĉiu aliĝinto speciala rajtigilo, per kiu la partoprenantoj en la Kongreso ricevos rabaton en la hispanaj fervojoj kaj en la plej granda parto de la eŭropaj fervojoj. Kun la rajtigilo estos senditaj detalaj instrukcioj.

Glumarko:

Estas acetebela ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 53-a UK. Prezo: 0,50 gld. (2 st.) por 10-glumarka folio.

Statistiko (je 4. 12. 1967): Arg. 1; Aŭstral. 1; Aŭstr. 2; Belg. 10; Braz. 2; Brit. 23; Bulg. 14; Ĉeĥ. 2; Danl. 9; Finn. 5; Franc. 36; Germ. 15; Grek. 1; Hisp. 53; Hung. 8; Israelo 1; Ital. 14; Jap. 3; Jug. 16; Kan. 3; Meks. 1; Monako 1; Ned. 22; Norv. 3; Nov. Zel. 1; Pol. 9; Port. 3; Sovet. 1; Sved. 15; Svis. 3; U.A.R. 1; Usono 11. Entute 290 el 32 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario.

JUBILEOJ

Centra Dana Esperantista Ligo estos 60-jara la 6-an de februaro.

La Klubo *Pacaj Batalantoj* en Jørpeland estos 30-jara la 23-an de februaro.

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

Kristiansands Esperantoklubb

14/12. Birger kondukis la kunvenon, kaj komencis la programon per parolado pri Martin Luther. Aldone al lingva kaj religia reformisto, Luther estis ankaŭ psalma verkisto kaj komponisto. Tiam ni komencis mangadon kaj babladon. Laŭ longe de nia babilada Landvojo, Stiansen iomete havis trafikajn malregulojn. Sed tiam sinjorino Hauge metis Stiansen en sian spiritan bankuvon, kaj forlavis lian obstinajn makulojn. Veninte el la spirita akvo de sinjorino Hauge, li komencis simili homon. Konkludo: La klubo ricevis kontenton kaj esperon.

La Esperantoklubo de Bergen.

28/10 oni kunvenis en Hotel Bristol por festi la 33. naskiĝtagon de nia klubo.

La prez. Elsa Værnor salutis kun la deziro ke la festo estu vigla kaj argabla.

Dum la tagmanĝo Agnes Hennemann faris la festparoladon en kiu ŝi pritraktis la pasintajn jarojn kun malĝojaj kaj viklecaj okazoj. Membroj asistis ŝin per siaj memoroj.

Åshild Birkenes parolis tre vigle por la sinjoroj. Lilly Davanger legis poemojn de Inger Hagerup. Kjell Offerdal pritraktis la tagon de U.N.O. kies ago tiu ĉi jaron koncernas la turismon. La venontan jaron la ĉefa afero estos forigi analfabetismon. La festo finiĝis kun multaj «Ĝis revido». Kun espero ni iris trans la sojlo en la novan laborjaron.

Laborkunveno okazis 8/11 en la hejmo de Elsa kaj Harald Værnor kiuj ankaŭ havis la programan respondecon.

La tiuvespera ekzerco estis leterskribado. Post laŭtleĝado de la rezultoj ni trovis seĝojn ĉe la kafotablo.

23/11, en Hotel Terminus, «Hispana vespero» La prez. sino Elsa Værnor gvidis.

Kjell Offerdal tre interese rakontis pri siaj travivaĵoj dum vojaĝoj kaj piedirado sur vojoj kaj montoj en Hispanujo, pri la moroj kaj homa konduto. Lilly Davanger legis artikolon «La sonĝoj» de la hispana verkisto Quevedo.

Kristian Sivertsen legis «Den falske duro» de Erling Vinsnes.

Humoran novelon pri Madrid kaj la vivo tie de Gunnar Reiss Andersen legis Leonora Sivertsen. Elsa Værnor pritraktis la kontraston inter urbega bruo kaj la kvieto en la urbetoj kaj kamparo. Dum la kutima kafo-paŭzo nia lingvo kaj laboro estis diskutataj.

4/12 ni okazigis nian kristnaskan kunvenon en la hejmo de geedzoj Jahren.

Åshild Birkenes prezentis sonbendon senditan de holanda samideano.

Okaze de la naskiĝtago de Ludwik Zamenhof, Johs Jahren priparolis lian vivon kaj speciale lian grandan laboron. Åshild Birkenes legis ironian poemon de Baghy, «Mi Esperantisto».

Nia gasto de Oslo, Finn Jahren, estis elpensinta «skĉeĉon» kiun li kune kun Jenny Jahren tre amuze prezentis.

J. Jahren.

Sanda Esperantoklubb

kunvenis 20. 11. en la hejmo de Karen Berge. La prez. Johan Matland bonvenigis. Ek de la alveno ĉiuj klubanoj parolis nur Esperanton. La prez. laŭtleĝis la rezolucion kiun sendis U.E.A. al U.N. kaj poste ni tradukis ĝin esperanten laŭvice. Montriĝis ke ni ĉiuj bezonas ekzercon! Estis disdonataj broŝuroj pri Hispanujo, la kongreslando venontjare. La sekr. prezentis kelkajn aferojn de Norvega Esperantisto, instigante al la membroj reagi je tiaj admono. Ŝi donacis libron por elotado, la monsumo estis sendota al NEL por la kontorfondado. Olav Andersen trovis artikolon (malfavoran al Esperanto) en Dagbladet, la artikolo estis vigle diskutata (ĉio en Esperanto!).

Sino Karen Berge kaj ŝia filino Målfrid en bonega manero regaligis nin.

15/12. En la hejmo de ges.roj Matland. La sekr. unune parolis iomete pri la tago de la libro kaj pri la Zamenhofa homaranismo. Poste la prez. priparolis la Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Ni mendis certan kvanton de la deklaro en Esperanto, de U.E.A. kaj post sia prelego la prezidanto disdonis ekzempleron al ĉiu ĉeestanto.

Post bongusta manĝaĵo kaj inspira kafo, la kunveno daŭrigis. De s.ro Thormodsen en Haugesund ni pruntis sonbendon kun in-

LA NORVEGA RADIO

dufoje sendis intervjuon kun paroĥestro Hans Amund Rosbach pri nia lingvo. La unuan fojon oni sendis la intervjuon dum loka programo de Vigra radio, la duan fojon la saman intervjuon dum «ni-timen» en la tut-regna programo.

Montriĝas, ke la eldono de du kristanaj libroj en la internacia lingvo vekis grandan atenton ekster la kadroj de la esperantistaro. Kiam la unua. Cent Himnoj, aperis, la gazetoj Østlendingen, Adresseavisen kaj Aftenposten interesiĝis, kaj la norvega televido montris filmon. La apero de la dua. Preparoj, vekis novan atenton, kaj ambaŭ gazetoj en Kristiansund (Romsdalsposten kaj Tidens Krav) faris notojn pri tio, poste aperis granda intervjuo en la semajna ĵurnalo Familien, same en Adresseavisen kaj ankaŭ la elsendo en la radio.

La intervjuoj donis eblecon ne nur priparoli la librojn eldonitajn, sed ankaŭ doni ĝeneralajn informojn pri la lingvo kaj la ideo malantaŭ ĝi.

Ni vere ĝojas, ke la neesperantistoj tiel vekigis. Espereble ankaŭ la esperantistoj vekigis, utiligas la intereson kreitan, kaj ankaŭ — per aĉeto kaj alia subteno — ebligas pluan evoluon de nia literaturo.

tervjuoj de konataj samideanoj, faritan en Rotterdam dum la kongreso. Ĉar ni bone konis almenaŭ du el la konatuloj, fariĝis tre interese aŭskulti al ili.

Ni lotumis Esperantan libron, kaj kelkaj geklubanoj ankaŭ aĉetis de la librokomisionaro Bjerke, kiu ĉiam bonvolas kunporti librojn en la kunvenojn.

La prez. finis per bondeziroj por la Kristnasko al ĉiu.

Elna Matland.

Klubo Esperantista en Oslo.

7/12.67. La kunveno prezentigis sub la titolo «KULTURA VESPERO kaj TAGO DE LA LIBRO», kaj la programo konsistis el jenaj eroj:

Oni komencis per komuna kantado de «La Espero».

Stein Winge, aktoro ĉe La Nacia Teatro deklamis du am-poemojn: «Mi amis vin» kaj «Versaĵo sen fino». Precipe la lasta estis tre amuza.

La Kluba Kantgrupo prezentis la kanton

LA GAZETA KURSO ANKAŬ EN HALDEN

«La Urso» en Sarpsborg informas, ke la kurso en la gazeto «Sarpen» nun tre kontentige funkcias. La redaktoron impenis la teteroj kun petoj kaj gratuloj. Estas tre utile daŭrigi la skribadon de salutoj al li.

Oni nun sukcesis igi ankaŭ la redaktoron de «Smaalenenes Amtstidende» en Halden presigi la saman kurson. Kompreneble ankaŭ al li oni nun direkto salutleterojn.

La agado de «La Urso» montras, ke oni povas, se oni volas. Ĉu ne samideanoj en aliaj urboj kun ofsetmetodaj gazetoj povas same fari?

JOSEFINA LARSSON-PRISSET AL EINAR DAHL

Ni kore gratulas al parlamentano Einar Dahl, kiu ricevis Josefina Larsson-prisset (premion mondlingvan) por sia laboro por Esperanto.

LA KORESPONDA SERVO

de Universala Esperanto-Asocio, K.S.M., 12, rue des Jacobins, F63 Clermont-Ferrand, Francujo, bedaŭras, ke norvegaj esperantistoj preskaŭ neniam uzas ĝin, sed oni daŭre ricevas korespondproponojn rilate al norvegoj.

«Zamenhofa Vespero» — teksto kaj muziko de la nederlandanoj C. Roelofs resp. Lou Visser; kaj svedan popolkanton «Sun', sun', sun'».

Asbjørn Syslak ludis klasikan muzikon, nome «Intermezzo»'n de Johannes Brahms, «Kanton sen vortoj» de Felix Mendelssohn kaj «Impromptu»'n de Franz Schubert.

Astrid Mansrud legis Hindan Legendon laŭ traduko de A. Grabowski.

Fine prezentigis la amuza skeĉo «La komerca lingvo», tre bone kaj lerte luditan de Gerd Jæger Pettersen kaj Otto Koren.

La programo estis tre bona kaj varia kaj la ĉeestantoj montris sian kontenton per forta aplaŭdo.

Harald Støp-Bowitz, kiu estras la librovendadon de Eldonejo Esperanto, havis la bonan ideon prepari libro-paketojn por aŭkcio en la klubo. Ĝi estis granda sukceso kaj montris la belan rezulton de kr. 195.—

Ĉar estis la lasta kunveno antaŭ Kristnasko, la longa tablo estis bele ornamita per kandeloj k.t.p.

Raportis Harda Danielsen.

P. Chr. Asbjørnsen:

LA TRI BOKOJ BRUSE, KIUJ EKIRIS AL LA MONTPAŝTEJO POR GRASIGI SIN

Iam estis tri bokoĵ, kiuj ekiris al la montpaŝtejo por grasigi sin, kaj ĉiuj nomiĝis Boko Bruse. Sur la vojo troviĝis ponto super akvofalo, kiun ili devis pasi, kaj sub tiu ponto loĝis granda, terura trolon kun okuloj similaj al stanaj teleroj, kaj nazo tiel longa kiel tenilo de rastilo.

Unue la plej juna Boko Bruse alvenis por transiri la ponton.

Trip trap, trip trap, sonis en la ponto.

— Kiu trotetas sur mia ponto? Kriis la trolon.

— Estas nur la malplej granda Boko Bruse; mi estas survoje al la montpaŝtejo por grasigi min, diris la boko. Lia voĉo estis tiel delikata.

— Nun mi venos por preni vin! diris la trolon.

— Ho ne, ne min prenu, ĉar mi ja estas tiel malgranda. Atendu nur iomete, tiam venos la mezgranda Boko Bruse, li estas multe pli granda.

— Nu bone, diris la trolon.

Post mallonga tempo la mezgranda Boko Bruse alvenis por transiri la ponton.

Trip trap, trip trap, trip trap, sonis en la ponto.

— Kiu trotas sur mia ponto? kriis la trolon.

— Estas nur la mezgranda Boko Bruse, kiu estas survoje al la montpaŝtejo por grasigi sin, diris la boko. Li ne havis tiel delikatan voĉon.

— Nun mi venos por preni vin, diris la trolon.

— Ho ne, ne min prenu. Atendu iomete, tiam venos la granda Boko Bruse, li estas multe, multe pli granda.

— Nu bone! diris la trolon.

Subite, jen venis la granda Boko Bruse. TRIP TRAP, TRIP TRAP, TRIP TRAP, sonis en la ponto. Li estis tiel peza, ke la ponto knaris kaj krakis sub li!

— Kiu trotegas sur mia ponto? kriis la trolon.

— Estas la granda Boko Bruse, diris la boko. Lia voĉo estis tiel raŭka.

— Nun mi venos por preni vin! kriis la trolon.

— Jes, venu nur! Mi havas du glavojn

por piki viajn okulokavojn!

Mi havas du ŝtonegojn, trolon, por frakasi ostojn kaj medolon!

diris la boko, kaj jen li ĵetis sin sur la trolon kaj elpikis liajn okulojn, frakasis ostojn kaj medolon kaj kornopuŝis lin rekte malsupren en la akvofalon; kaj jen li iris al la montpaŝtejo. Tie la bokoĵ fariĝis tiel grasaj, tiel grasaj, ke ili preskaŭ ne povis iri hejmen, kaj se la graso ne foriĝis, ili ankoraŭ restas grasaj.

Snip, snap, snute

kaj jen finiĝis tute.

tradukis el la norvega:

Grupo Esperantista de Trondheim.

UNIVERSITATA KURSO EN FINNLANDO

Mag. Vilho Setälä, membro de la Akademio de Esperanto, gvidas oficialan Esperanto-kurson en la Universitato de Helsinki. La kurso komenciĝis an oktobro 1967.

POŝTMARKO KUN ESPERANTO TEKSTO

Ĉeĥoslovakujo ĵus eldonis la 49-an poŝtmarkon de la mondo kun teksto en Esperanto, okaze de la Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj en 1968. La marko estas 5-kolora, la valoro estas 5 kcs.

NOVA MONERO

La Universala Ligo emisiis plian metalan moneron, kies valoro estas 25 steloj. La jam ekzistantoj moneroj valoras 1,5 kaj 10 stelojn.

INTERNACIA ESPERANTO-SOMERO PIESTANY

7.—20. VII. 1968

Niajn E-kursojn *povos vizitadi* ankaŭ tiuj interesantoj, kiuj nek loĝos, nek manĝos en la kadro de Internacia Esperanto-Somero. Pago por la kurso: 120,— Kcs.

En la kabanaro povas pasigi sian libertempon ankaŭ tiuj interesantoj, kiuj *ne partoprenos* niajn E-kursojn.

LEGU!

Vi bezonas legi Esperanton. Ĉi tiu eta gazeto en sufiĉas. Pruntu librojn en la bibliotekoj — eĉ se vi ne legas ilin!

Korespondu!

Komencanto en suda Francujo deziras korespondi per poŝtkartoj. Antoni André, Atelier de La Londe, *La Londe 83*, Francujo.

Ĉu unu el vi volus korespondi pri ĉiaj temoj? F. v. Wegen, Calchaslaan 12, *Eindhoven*, Nederlando.

Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj pri diversaj temoj. Borislav Popoviĉ *Majevac-Doboj*, S.F.R. Jugoslavio.

Mi estas ĉino kaj havas 21 jarojn. Mi studas en la universitato de Hong Kong. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. Ĉu iu el viaj liganoj volus korespondi kun mi? Lee Kwok Pun, 158, Java Road, 4th floor, *Hong Kong*.

Volus korespondi pri la vivo, laboro kaj eventuale kutimoj en niaj landoj. Marian Jezyk, 39-jara oficista, *Gliwice*, Skrytka 299, Pollando.

20-jara oficisto deziras korespondi. Jaroslav Ureš, K. Čapka 1357, *Sokolov*, Ĉeĥoslovakujo.

19-jara studentino deziras korespondi kaj kolekti bildkartojn de kinoartistoj. Saudulesku Maria, Giulești, Oltetu, *Oltenia*, Rumanujo.

34-jara hugara instruistino deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Intereso: libroj, muziko, fotografado, lingvoj. Kolektas bildkartojn. Julia Kós, *Békéscsaba*, Thesedik 58, Hungarujo.

Tridek lernantinoj (16—18-jaraj) en mez-medicina lernejo por flegistinoj en Zagreb ŝatas korespondi kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Skribu amase al Esperanto-Grupo, Škola za Medicinske Sestre, Mlinarska 34, Zagreb, Jugoslavio.

La membroj de nia malgranda klubeto Esperantista deziras korespondi pri ĉiuj problemoj precipe pri: Kuracistaj aferoj, Turistmo, Loaj kulturo, Nutraĵindustrio. «Nova Vojo» Olvedy Karolo, Rementea F. C. L. Rai: Gheorgheni Reg: M. A. M., *Rumanujo*.

Franca 16-jara lernantino de instruistina seminaro tre deziras akiri letter-amikinojn (aŭ amikojn) el via lando. F-ino Nadine Lack, Ecole Normale d'Institutrices 2 Montée Jues Isac, F13-Aix en Provence, Francujo. Interesiĝas pri sporto (judo) kaj filatelio. Ŝi eklernas Esperanton kaj deziras perfektigi en la lingvo per korespondado.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo.